La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-16 n-ro 418

# Sud-Afriko: kolero kreskas kontraŭ H&M




Abbas rifuzis mediacion de Usono pri konflikto inter Palestino kaj Israelo

Aŭstrio: timo antaŭ la «naziaj radikoj»

La Devonia grandskala estingiĝo estas iomete plibone komprenata

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Sud-Afriko: kolero kreskas kontraŭ H&M
*La magazeno H&M de Johanesburgo estis difektita fare de manifestaciantoj p. 03*

Aŭstrio: timo antaŭ la «naziaj radikoj»
*Dekstra-ekstremdekstra koalicio p. 03*

ABBAS rifuzis mediacion de Usono pri konflikto inter Palestino kaj Israelo
*Usono 43 fojojn uzis sian vetoon dum konsiliĝo pri rezolucioj koncernaj al la palestina demando en la UN p. 04*

20-jaraĝulo gajnis US$451mln prize en loterio en Usono
*Shane MISSLERP. 04*

La Devonia grandskala estingiĝo estas iomete plibone komprenata
*Antaŭ 374 milionoj da jaroj p. 05*

Hodiaŭe
*Kálmán MIKSZÁTH; kaj Lakta Vojo p. 05*

Tutjara pedeleko sur kvar radoj
*Nova pedalveturilo p. 06*

Milito de la Planedo de simioj – historio pri elektebla identeco
*Kio estas la identeco? p. 07*

## Sud-Afriko: kolero kreskas kontraŭ H&M

La magazeno H&M de Johanesburgo estis difektita fare de manifestaciantoj, malkontentaj pro reklamo, kiun ili juĝas rasisma.

Manifestaciantoj sukcesis eniri en la magazenon de vestaĵoj, kaj ŝtelis varojn. «Ni disigis ilin pafante kaŭĉukajn kuglojn», eksplikas la polico.

Reklamo estas origine de la kolero. Sur svetero de nigra knabo, videblas la skribaĵo: «La plej mojosa simio el la ĝangalo».




De post ĝia publikigo antaŭ semajno en sia retpaĝaro en Britio, la giganta sveda societo ricevas viglajn kritikojn de la sud-afrikanoj, kvankam la foto estis eksigita, kaj ekskuzoj prezentitaj de H&M.

En 2015, ekde la malfermo de siaj du unuaj magazenoj sur la afrika kontinento, dum kelkaj miris, ke nur stariĝas blankaj manekenoj, H&M indignigis multajn homojn, sub-komprenigante, ke la nigraj manekenoj vehiklas negativajn mesaĝojn.

Neniam Milito Inter Ni

---

## Aŭstrio: timo antaŭ la «naziaj radikoj»

Ili ne deziras tiun koalicion inter dekstro kaj ekstremdekstro. 20 000 personoj, familioj, pensiuloj, maldekstraj simpatiantoj, studentoj, manifestaciis en Vieno, kontraŭ la alianco, kiu regas de antaŭ monato. La registaro enhavas ses ekstremdekstrajn ministrojn, inter kiuj Heinz-Christian Strache, ĉefo de la FPÖ, kaj vic-kanceliero.

«Tiuj ekstremdekstraj ministroj, diris manifestaciantino, kiel tiu pri Internaj aferoj aŭ pri Transportoj, kaj la aliaj de la FPÖ, apartenas al partio, kies radikoj kuŝas en la nazia partio».




En la defilado, multaj sloganoj referencis al la *Anschluss*, anekso de Austrio al Germanio, kiu okazis antaŭ 80 jaroj, en marto 1938.

Jam komence de la 2000-aj jaroj, Aŭstrio estis ege kritikata pro dekstra-ekstremdekstra koalicio.

Neniam Milito Inter Ni

# Abbas rifuzis mediacion de Usono pri konflikto inter Palestino kaj Israelo

Palestina prezidento Mahmoud Abbas diris dimanĉe [14 jan 2018] en la urbo *Ramallah*, ke la palestina flanko malakceptas la mediacion de Usono pri la konflikto inter Palestino kaj Israelo.



Abbas faris la rimarkojn en la malferma ceremonio de urĝa kunveno de la Centra Komitato de la Palestina Liberiga Organizo. Li diris, ke la Palestina Liberiga Organizo ne traktas plu Usonon kiel madiacianton.


Abbas diris, ke Usono 43 fojojn uzis sian vetoon dum konsiliĝo pri rezolucioj koncernaj al la palestina demando en la UN. Li akcentis, ke la palestina flanko petos plu la internacian komunumon agnoski la Palestinan ŝtaton kaj certigi la leĝajn rajtojn de la Palestina popolo kaj la leĝan statuson de la Palestina Liberiga Organizo. Li diris, ke Orient-Jerusalemo estas la ĉefurbo de la Palestina ŝtato. La Palestina popolo neniam rezignos siajn rajtojn kaj neniel ripetos siajn erarojn. Li aldonis, ke la palestina flanko daŭrigos siajn kontaktojn kun israelaj pacamaj personoj por diskuti kiel realigi pacon inter Palestino kaj Israelo.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# 20-jaraĝulo gajnis US$451mln prize en loterio en Usono

Vendrede la 12-an de januaro la loterio de la usona subŝtato Florido indentigis Shane Missler (20-jaraĝa, loĝanta en *Port Richey*, Florido) kiel venkinto de la prizo je 451 milionoj da usonaj dolaroj, de la loterio "*Mega Millions*" lotumita je la tago 5-a. Anstataŭ ricevi ĝin per jaraj partoj li preferis solan pagon da USD 281.874.999,00.



Li aĉetis kvin biletojn en la oportuna butiko "*7-eleven*", per "rapida vetado", kies numeroj estis hazarde difinitaj de ties sistemo. Inter ili estas tiu kun la lotumitaj numeroj: 28, 30, 39, 59, 70 kaj la lasta numero, kiu nomiĝas "*Mega Ball*", estis 10.

Intervjue al la gazeto "*Tampa Bay Times*" la junulo asertis ke li prizorgu sian familion, iomete amuziĝu dum vivado, pretigu vojon al financa sukceso celante postlasaĵon, kaj ankaŭ faru ajnan bonon al la homaro per parto de la mono.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

# La Devonia grandskala estingiĝo estas iomete plibone komprenata

Antaŭ 374 milionoj da jaroj, la Tero konis sian pli gravan grandskalan estingiĝon de ĝia historio. Nova studo asertas ke tiu fenomeno estas ligita al interago inter ciklaj klimataj ŝanĝoj kaj astronomiaj parametroj.



Antaŭ 374 milionoj da jaroj, en la Devonio, la Tero konis rapidan kaj grandskalan koloniadon de la prakontinento de teraj plantoj sub varma kaj tropika klimato. Tiom granda estis la kvanto da vegetaĵoj en la maro ke ĝi ensorbis sufiĉe da oksigeno por malebligi la oceanan vivon. Tiu fenomeno okazis dum la rotacio de la tero ĉirkaŭ la suno estis tiam preskaŭ cirkla.

Tial, la sezonoj tiam, preskaŭ ne plu ekzistis. Fakte kvankam la jara sezona ciklo estas ĉefe kaŭzita de la klineco de la Tera rotacia akso, estas ankaŭ klimata ciklo ligita al terorbita ciklo laŭ la teorio de Milankovitch. Nu, en tiu periodo, la oksigeno malbone solviĝis en la oceano pro tiu cirka orbito kaj ĝia influo sur la maraj fluoj. La teamo el germana universitato (Marum, *Bremen*) malkovris ke la formo de la Terorbito ĉirkaŭ la suno povas esti uzata por mezuri la rapidecon de la grandskalaj estingiĝoj. La estro de tiu studo asertas ke la ĉefa kaŭzo de la Devonia estingiĝo, kiu malaperigis 80% de la vivaĵoj en 600 000 jaroj, restas la satureco de la oceanoj per vegetalaĵoj sed ke la orbita formo, cirkla, rapidigis la estingiĝon. La geologia pruvo troveblas en du tavoloj de nigra skisto. Tiu koloro montras ke la rokformado okazis en medio malriĉa je oksigeno. Tiu oksigenomanko favoris la konservadon de la fosilioj kaj organikaj aĵoj troveblaj en tertavolaj skistoj.

Anthony Lucas
ISAE




# Kálmán Mikszáth

**Mikszáth Kálmán (aŭ esperantigite Kolomano; naskiĝis la 16-an de januaro 1847 en *Szklabonya*; mortis la 28-an de majo 1910 en Budapeŝto) estis hungara verkisto kaj ĵurnalisto.**

**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**

**Vikipedio**



# Bildo de la tago

**Lakta Vojo vidita de la okcidenta estona marbordo.**

**Vikipedio**

# Tutjara pedeleko sur kvar radoj

Principe biciklo estas la plej bona veturilo por transporti unu personon ĝis distancoj de proksimume 20 kilometroj. Krome, ĝi ne ŝarĝas la medion, bonaj biciklaj vojoj ne konsumas valoran terenon kaj la tretado en la pedalojn estas sanakcela.



Tamen biciklo havas siajn limojn, ne nur pro la atingebla distanco, sed ankaŭ pro la veteraj cirkonstancoj. Rilate al la distanco nun ja disponeblas subteno per elektra motoro. Tiel ekipita biciklo nomiĝas pedeleko. Sed se la veteraj cirkonstancoj estas malfavoraj, tiam eĉ la elektra helpo ne sufiĉas. Tio validas precipe por la vintra sezono.

Eĉ se oni portas varmigajn vestaĵojn: Biciklado dum vintro ne estas plezuro. Oni bezonus vestaĵon ankaŭ por la tuta veturilo por havi protekton kontraŭ malvarmo, vento, neĝo kaj pluvo. Tia veturilo ĝis nun ne ekzistas, sed en Svedio naskiĝis ideo pri tio.

Pedelekoj ja nun estas tre popularoj, sed se la vetero estas malseka kaj malvarma, tiam oni apenaŭ vidas la elektre subtenatajn biciklojn sur la stratoj. Por havi veturilon ankaŭ por la vintro, svedo Mikael Kjellmann disvolvis fermitan, kvarradan veturilon kun pedeleka motoro kiu el teknika vidpunkto similas al kuŝbiciklo kaj laŭ aspekto al aŭtomobilo el la bildstrio "*The Peanuts*".

Por la pedalveturilo kun la nomo "*Podride*" jam sukcese okazis amasfinanca kampanjo. La veturilo kiu staras sur kvar 20-colaj radoj estas 1,80 metrojn longa, 75 centimetrojn larĝa kaj 1,45 metrojn alta. Danke al interaksa distanco de nur 88 centimetroj la direktoŝanĝa cirklo mezuras nur 3,5 metrojn.

Alie ol plej multaj tri- aŭ kvarradaj kuŝbicikloj la *Podride* (podrajdo) ofertas en sia fermita pasaĝera kabino seĝon kiu disponigas sidaltecon je la nivelo de aŭtomobilveturantoj. La teksaĵkovrita kabino inkluzive de la protekta glaco estas antaŭendirekte elfaldebla kaj tiel permesas komfortan eniron. Kroman komforton prizorgas aerkomprima suspensio. Kaj la veturilo havas antaŭajn kaj malantaŭajn lumigilojn kaj signalilojn.

La iom pli ol 70 kilogramojn peza veturilo estas stirebla helpe de du apud la seĝo muntitaj leviloj. La pedaloj movas la malantaŭan akson kaj la tretanto ricevas subtenon de elektra motoro kun 250 W kiu estas muntita sur la pedala akso. Kiel kutime ĉe pedelekoj la maksimuma rapideco estos 25 km/h. Kaj per unu ŝargo de la baterio la subteno sufiĉos por proksimume 60 km.

Ĝis nun ekzistas nur prototipo de la nova veturilo. Oni serĉas privatajn investantojn por kolekti la monon por fondo de entrepreno kaj por la konstruado de pluaj prototipoj. Paralele oni prilaboras ankoraŭ teknikajn detalojn. Se la serĉado pri investantoj estos sukcesa, tiam eblos disvolvi la kvarradan pedelekon ĝis seriprodukta matureco. Kiam tio atingiĝos, tio en la nuna situacio estas necerta. Kaj ankaŭ pri ebla prezo ankoraŭ ne eblas doni indikon.

Do ni esperu ke iutage ni povos uzi tian medikonvenan veturilon.

Esperanta Retradio

# Milito de la Planedo de simioj – historio pri elektebla identeco

Flugo de Ŝanĥajo al Moskvo estis longa, do mi havis tempon por spekti la tutan faman trilogion. La plej interesa mi konsideras la finan parton, ĉefe pro la ideo kiu staras malantaŭ fantasta eksteraĵo kaj spegulas pure homan historion – tiun pri elektebla identeco.




**De sklaveco al la fina venko**

Apenaŭ indas rerakonti ĉi tie la tutan intrigon, unuafoje prezentitan sur ekranoj en 1968, do mi estos konciza.

En la unua filmo juna sciencisto serĉas kuracilon kontraŭ la *Alzheimer*-malsano, pro kiu suferas lia patro ĉiutage sinkante en la senrevenan forgeson. Li eksperimentas je simioj kaj parte sukcesas, sed monavida ĉefo decidas rapidigi la ekspermentojn malgraŭ liaj avertoj. La novkreita infekto likas ekster laboratorio kaj komenciĝas epidemio, kiu mortigos preskaŭ la tutan homaron.

Solaj estaĵoj kiuj profitis tion estis la laboratoriaj simioj, kies intelekto draste altiĝis kiel flankefiko de la eksperimento. Ili ribelas kontraŭ siaj sklavigantoj kaj fuĝas al arbaro, gvidataj de Caesar – la simio, adoptita de la sciencisto kaj la plej evoluinta danke al lia kuracilo.

En la dua parto ni vidas Usonon post la infekta apokalipso. En la morte malplena Nov-Jorko grupo da homoj luktas por la vivo, sen ilia fuelrezervoj elĉerpiĝas, do por plu havi elektroenergion necesas restarigi hidroelektrocentralon el proksima arbaro. Sed tiu areo estas kontrolata de la simia tribo subestre de Caesar.

Konfrontiĝo de la komunumoj atingas sangoverŝan fazon, kiam simio Koba, suferinta dum jaroj en laboratorioj, kaŝe pafas Caesar kaj provokas militon por kapti la potencon kaj lasi vojon al sia malamego kontraŭ la homoj. Sed Caesar saviĝas, revenas kaj post kruela duelo mortigas la perfidulon.

La tria epizodo prezentas jam alian situacion. Soldatoj, senditaj de la enigma kolonelo, mortigas simiojn en la arbaro. Tiuj respondas, montrante samtempe forton kaj kompaton al la kaptitoj, sed decidas translokiĝi por saviĝi de la homaj atakoj. Nur ilia gvidanto Caesar, perdinta siajn filon kaj edzinon, deziras unue venĝi, do iras serĉi Kolonelon akompane de kelkaj fideluloj. Laŭvoje ili trovas en malplena dometo knabinon, kiu perdis parolkapablon, kaj sekvas ilin kiel sian solan esperon.

Sekvas batalo – unue inter la simioj kaj soldatoj de Kolonelo, poste inter la lastaj kaj taĉmento sendita el alia regiono. Fine ĉiujn kovras neĝa lavango, kiun postvivas nur simioj grimpintaj sur altajn abiojn. La vundita Caesar mortas kun malpeziĝinta koro. "Koba infektis min je malamego" triste agnoskas li. La simioj foriras renkonte al nova vivo.

**Kiu estas bestaĉo?**

La tri epizodoj prezentas tri malsamajn

ideojn. La unua rakontas pri sklava ribelo – detrua kaj senkompata. La dua montras kiel malfacilas al malsamaj komunumoj trovi modus vivendi [vivmanieron], kio tamen estas sola vojo por daŭrigebla ekzistado. Sed la plej interesa ŝajnas al mi la tria epizodo, kies kernan ideon mi difinus kiel elektebla identeco.




Kio estas la identeco? Ni elektas ĝin sendepende de niaj sango kaj aspekto. Homoj de Kolonelo pensis esti la lasta espero de la homaro, sed iĝis terura karikaturo al ĝi. Ili plendis kontraŭ la simioj, sed ili mem iĝis bestaĉoj, nur homaspektaj. La simioj ne elektis sian identecon dum la homoj jes. La knabino per gestolingvo demandas ĉimpanzon, ĉu ŝi estas la simio? Tiu respondas: vi estas Nova.

La homoj perdas parolkapablon, dum la simioj ekparolas. Ĉu granda problemo? Sed ni vidas ke la muta knabino facile interkompreniĝas kun la simioj, dum la parolkapabla Kolonelo ne sukcesas interkonsenti nek kun la parolanta Caesar, nek eĉ kun aliaj homoj.

Paraleloj al la nuntempa vivo abundas. Similan kontraŭstaron ni povas vidi inter la novaj eŭropanoj forme de migrantoj kaj ekstremdekstruloj, kiuj pretendas esti gardantoj de la eŭropaj valoroj. Ili nomas sin veraj homoj kaj la alvenintojn – nuraj animaloj. Tamen en realo ili mem estas kontraŭ-Eŭropo, detruante la bazajn principojn de la eŭropaj etiko kaj kulturo, ellaboritajn dum jarmiloj.

Same la rusaj naciistoj konstruas novan ideologian realon, inventante ne nur estontecon, sed ankaŭ pasintecon. Ili adoras Rusujon kaj la Rusian imperion, sen scii ke tiuj baziĝis sur tute aliaj principoj – lojaleco al komuna caro, sub kies aŭspicio kunvivis malsamaj etnoj kun siaj religioj, lingvoj kaj kulturoj. Ili detruas sian (laŭdire) amatan patrujon sen kompreni tion.

Feliĉe nun la rusia ŝtato vidas ilian danĝerecon kaj aktive persekutas la idiotojn. Sed ni povas vidi ke en Ukrainio, Hungario, Pollando kaj pluraj aliaj ŝtatoj, kies loĝantoj ŝatas fanfaroni pri sia "eŭropeco" kaj moki "rusajn barbarojn", la ekstremdekstraj ideoj iĝas ĉiam pli popularaj, ofte favorataj je la ŝtata nivelo. Dum plejparto de la rusaj naciistaj grupaĉoj estas detruitaj kaj iliaj gvidantoj enprizonigitaj por pluraj jaroj, iliaj eŭropaj kompliculoj sentas sin tute komforte, disvastigante malamegon kaj atakante (perforte kaj vorte) la rifuĝintojn, relative malmultajn en Orienta Eŭropo (kompare kun Germanio kaj Rusio). Ĉu tiuj homaspektaj bestaĉoj venkos kaj la "civilizita Eŭropo" denove iĝos nesto de la kontraŭhoma ideologio?

Fine de la filmo ĉiuj homoj pereas. Soldatoj malaperas sub blanka neĝotavolo kaj samtempe mortas Caesar, kies koro estis kontaĝita je malamego. Do naskiĝis ŝanco konstrui la novan vivon de sur la blanka listo. Ĉu la simioj sukcesos? Espereble jes. Sed ĉu sukcesos ni?

Stano Belov
stanobelov.blogspot.com